

Duonjarcento de Sennacieca Asocio Tutmonda, 5-a parto
Claude Gacond, 408-a radioprelego, 1971.08.04 & 07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi semajnon okaze de sia 44-a kongreso Sennacieca Asocio Tutmonda festas duonjarcenton de ekzistado. Ni partoprenas tiun jubileadon dediĉante lastan kaj kvinan radioelsendon al SAT.

A.- Post la krizo de 1931, kiu kondukis al skismo inter la SAT-anaro kaj la komunistoj, komenciĝis nova periodo kun malpli da internaj konfliktoj.

Cl.- Tamen ne abundis la trankvilaj jaroj. La naskiĝintaj faŝismoj kaj la akriĝo de la naciaj luktoj, se ili unuflanke aktualigis la taskon de Sennacieca Asocio Tutmonda, ili aliflanke igis ĝin ĉiam pli malfacile diskonigeblan.

A.- Multaj landlimoj hermete fermiĝis al la organoj de SAT : *Sennaciulo* kaj *Sennacieca Revuo*. Ankoraŭ nun ekzistas pluraj landoj, kie estas nek eble aboni, eĉ nek eble ricevi tiujn gazetojn.

Cl.- Tio estas pruvo, ke sennaciismo havas aktualecon, kaj ni tre esperas, ke en la landoj, kie estas eble aĉeti la neelĉerpitajn verkojn de Eŭgeno Lanti kaj legi la organojn *Sennaciulo*, *Sennacieca Revuo* kaj *La Juna Penso*, multaj geaŭdantoj foje okulumos al tiuj libroj kaj gazetoj.

A.- Kiam ni ekzamenas la esperanto-arkivojn en Svislando, tiam ni rimarkas foreston de la verkoj de Lanti kaj de la organoj de SAT. Kiel en multaj aliaj landoj, en Svislando la SAT-anaro ne estas tre abunda. Nun la statistikoj anoncas en Svislando 30 SAT-membrojn en 17 lokoj.

Cl.- Pere de la libro-servo okaze de la oficialaj esperanto-kunvenoj ne estis eble aĉeti la librojn de Sennacieca Asocio Tutmonda, kiuj rilatis al ideologiaj temoj. Verŝajne tiel ankaŭ estas en multaj aliaj landoj. Nun tio ŝanĝiĝas, kaj pli kaj pli en la reorganizitaj libro-servoj oni ektrovas ĉiujn esperanto-eldonaĵojn. Almenaŭ tiel estas nun en Svislando en la kadro de la libro-servo de Kultura Centro Esperantista.

A.- Kio malhelpis en multaj landoj la disvastigon de la sennaciismo, tio estas ĝia ligiteco kun la klasbatalismo. Hodiaŭ la laboristoj emancipiĝas el la politikaj influoj, kiuj karakterizis la proletaron dum la unua duono de nia jarcento kaj tial malakriĝas la konflikto inter la neŭtrala esperanto-movado kaj Sennacieca Asocio Tutmonda.

Cl.- Tamen ĝi restas nesolvita. Ĝi fontas el decidoj prenitaj en la dua SAT-kongreso, kiu okazis en 1922 en Frankfurto, Germanio, kaj kiu grupigis 232 SAT-anojn. Tiu kongreso decidis per 90 voĉoj kontraŭ 29 kaj 78 sindetenoj, ke SAT-ano ne rajtas esti samtempe membro de iu burĝa kaj tiel nomata neŭtrala esperanto-organizo.

A.- La verkisto Romain Rolland, kiu atente sekvis la esperanto-aktualecon, leginte pri tiu decido, deklaris sian malsolidariĝon kun tiu statuta malpermeso.

Cl.- Por Romain Rolland, tiuj esperantistoj tute ne konsciis pri la grandeco de esperanto. Esperanto estas, per si mem, revolucio multe pli efika, ol ĉiuj revoluciaj tendencoj, ĉar ĝi instigas al nova pensmaniero internacia, sennacieca kaj tutmonda.

A.- En Svislando la esperantisto Edmond Privat, kiu ludis tre gravan rolon en la socialista partio kaj en la kooperativa medio pere de siaj regulaj gazetaj kronikoj en la franca lingvo, ne povis aliĝi al SAT pro tiu devigo forlasi ĉian kunlaboron kun la neŭtrala movado. Kiam oni legas la verkojn de tiuj esperantistoj, oni konscias, ke SAT perdis multon, forigante similajn fortojn.

Cl.- Nun tiu problemo malakriĝis. Multaj SAT-anoj estas membroj de aliaj societoj. Ekzemple tio estas nia situacio. Estante konvinkitaj sennaciistoj, ili ne povas akcepti tiun statutan limigon, kiu ilin disigas de la ceteraj esperantistoj. Kaj cetere, okaze de sia vojaĝo tra la mondo, Eŭgeno Lanti mem konstante rilatis kun la tiel nomata neŭtrala esperanto-movado.

A.- Nun en la junularo de SAT oni sentas la bezonon diskuti pri tiuj problemoj. Ekzemple en la organo *La Juna Penso*, kies legadon ni ege konsilas al niaj geaŭdantoj, sub la titolo « *Baldaŭ jubileo de SAT sed* » aperis artikolo pri la temo, kiu nin interesas.

Cl.- En ĝi oni rimarkas la alfrontadon de du ecoj : por iuj membroj Sennacieca Asocio Tutmonda estas ĉefe organizaĵo, kies celo estas utiligi la internacian lingvon esperanto por klasaj celoj de la laboristaro tutmonda. Tiujn membrojn ĉefe interesas la socialismo de SAT. Por aliaj membroj la ĉefa celo de Sennacieca Asocio Tutmonda estas ne la socialismo, sed la sennaciismo, la tutmondeco.

A.- Tiu dualismo ekzistis ekde la komenco. Ĝi donis al SAT ties originalecon. Kaj ĝi ĝin konservas en la kondiĉo, ke ĉiuj SAT-anoj kapablos pensi superpartiece. Legante kelkajn artikolojn, ĉefe en la organo de la junuloj, oni havas la impreson, ke en iuj SAT-medioj ree naskiĝas netoleremo rilate al la aliaj politikaj vidpunktoj. Povu tiu netoleremo esti nur momenta.

Cl.- De 1921 ĝis 1971 iom post iom konstruiĝis mondo pli unueca. Kreiĝas vastaj federacioj. Tamen ni havas la impreson, ke la ĉeloj de tiu nova mondo restas la nacioj, kaj ke pro tio multaj minoritatoj restas subpremataj, ke multaj aktualaj problemaj ekvilibroj estas neglektitaj.

A.- Ŝajnas al ni, ke Sennacieca Asocio Tutmonda devus iniciati komparajn studojn pri la nun iom post iom konstruiĝanta mondo internacia kaj la de ĝi celata sennacieca mondo, kie la nacioj perdas iom da tereno profite al aliaj ecoj : la profesio, la geografia regiono, la simileco inter la solvendaj problemoj.

Cl.- Sed ĉu Sennacieca Asocio Tutmonda kapablos entrepreni similajn studojn ? Ĉu nun ĝi ne vivas de hereditaj dogmoj, kiuj restas nebule teoriaj kaj malhelpas pluan paŝon antaŭen ? Se estas tiel, SAT iom post iom perdos sian forton profite al alia movado.

A.- Se kontraŭe SAT kapablos malfermi debatojn en absoluta objektiveco pri la nunaj problemoj, kiujn alfrontas la konstruo de sennacieca homaro, tiam ĝi vekos la intereson de konstante kreskanta nombro da esperantistoj. Sed samtempe oni devos akcepti forlasi kelkajn dogmojn, kiuj disigas la homojn, pli ol ili unuigas ilin.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-